

N° 200  
octobre  
novembre  
décembre  
2022

# LA INFORMILO

N° 200  
oktobro  
novembro  
decembro  
2022

l'espéranto  
la langue de l'amitié  
sans frontières

esperanto  
France-Est

ESPERANTO  
2022  
Justa komunikado

esperanto  
★ estas ★  
mojosa!

## ESPERANTO

### FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

### ESPERANTO

regroupant  
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes  
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

### ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18 €

Reta abono: 7,50 €

Certes, la pandémie a été la raison pour laquelle le nombre des espérantophones ayant participé au congrès mondial d'espéranto à Montréal a été moins grand que prévu. Mais peu à peu les rencontres en présentiel ont vu augmenter le nombre des participants. Ainsi plusieurs membres d'Espéranto France-Est ont participé à des rencontres internationales et des congrès à Métabief (Doubs), à Trélissac (Dordogne), Roquebrune-sur-Argens (Var), en Allemagne (Heilbronn et Erpfingen) ainsi qu'en Italie (Brescia). D'autres sont même allés à Klaipėda (Lituanie) pour participer aux Baltiaj Tagoj, une rencontre culturelle qui rencontre un énorme succès, et ce depuis des décennies.

Nul doute que – si la pandémie décline – ils seront nombreux cette année à se donner rendez-vous à Lyon (Congrès d'Espéranto France) et en Italie, à Turin, où se déroulera le congrès mondial de l'Association Universelle d'Espéranto (UEA).



## SAMIDEANOJ DEĴORAS ĈE ESPERANTO-BUDOJ



Forumo por asocioj en Sainte-Savine (Aube)

La 3an de septembro la urbestro de Sainte-Savine organizis forumon por diversaj asocioj. Esperanto10 partoprenis kaj prezentis belan kaj allogan standon (rigardu la fotojn!) Multe da vizitantoj haltis kaj babilis kun ni. Infanoj kaj eĉ gepatroj ŝatis ludi per esperanto-domenoj mane faritaj el ligno de amikino. Ĉiuj ĝuis kompreni sen esti lernintaj Esperanton!

Ni foriris kun dekdu ret-adresoj... kaj atendas novajn lernantojn!  
Esperanto10



La 25an de septembro okazis la libro-foiro en la valo de Thann, en la parko de Wessering. Roberto havis kontaktojn tie pro antaŭ-jaraj deĵoradoj. Tial ni refoje estis akceptitaj por prezenti Esperanton. Pluraj personoj venis al nia tablo kaj ricevis prospektojn. Iuj eĉ aĉetis librojn.

Andreo



Dank'al interŝanĝo de informoj, ni eksciis, ke en aliaj regionoj de Francio, samideanoj deĵoras kaj informas pri nia Lingvo. Jen pri Avignon (84), La Ciotat kaj Marseille (13) Fréjus (83). Gratulon al ĉiuj.

Renée Triolle kaj Patrick Chevalier



## 70a datreveno de FISAIC en Bischheim (Strasburgo) (Internacia federacio de la fervojistaj societoj pri arto kaj kulturo (FISAIC)) 4a ĝis la 6a de novembro 2022

Partoprenis Rodica Todor prezidantino de IFEF por la ĝenerala kunveno, Vito Tornilo deĵoris kun mi dum tri tagoj. Vendrede vespere la esperantistoj Bruno Flochon el Strasburgo (Prezidanto de Esperanto France), Michel Basso el Colmar kaj Alena Adler el Usono vespermanĝis kun ni. Michel Basso transdonis al Vito la longan banderolon kun la emblemo de la IFEF kongreso en Colmar.



Dimanĉe matene Alena Adler kaj Bruno Flochon iom deĵoris kun ni. Ni diskutis kun Philippe Rouche de UAICF kaj aliaj partoprenantoj de la ekspozicio (Fotoj, Pentraĵoj, Filatelistoj, Genealogio, Radio Amatoroj). La etoso inter la grupoj de ekspoziciantoj estis tre bona.

Mi diskutis en la franca pri Esperanto kun rumana fervojisto el FISAIC kaj kamarado de mia sindikato CGT Alian Philippi kiu estas membro de la ĝenerala konsilantaro de UAICF. Rodica Todor reklamis pri esperanto al la homoj, kiuj partoprenis la ĝeneralan kunvenon. La urbestro de Bischheim partoprenis la ignaŭguron de la ekspozicio kaj diris al la esperantistoj, ke ekzistas strato "Esperanto" en Bischheim. Li ne scii pro kio oni nomis la straton "Esperanto". Ni faris foton ĉi tie kun esperantistoj. Oni diris ke la urbo reklamis per interreto kaj elektronikaj tabuloj en la urbo (sed mankis la adreso de la loko sur la tabuloj) kaj UAICF kontaktis la riparejon de TGV "Technicentre de Bischheim" kie laboras 1 000 fervojistoj. Mi pensas ke ili ne venis al ni.



esperantistoj ĉiam semas kaj la rikolto venas pli poste.

Vendrede post la 17:00 vizitis la ekspoziciojn kelkaj dekoj da homoj de FISAIC kiu partoprenis la ĝeneralan kunvenon. Sed poste sabate kaj dimanĉe malmulte da homoj (ĉirkaŭ 15) venis. Ĝenerale estis amikoj de la ekspoziciantoj.

La ekspoziciantoj tre bedaŭris, ke malmulte da homoj vizitis la ekspozicion. Ni uzis multe da tempo por malgranda rezulto. Kelkaj venis de Parizo kaj de Orleano per propra aŭto kun multe da materialoj. Sed mi ne malesperas ĉar



Rodica Todor diris ke oni uzis la anglan en la ĝenerala kunveno sed por interkompreniĝi estis iom malfacile, ĉar la plejmulto balbutas la anglan. En la restoracio homoj grupiĝis laŭ la lingvo parolata.

Mi diras, ke fakte la afero estis bone organizita kaj okazis interesaj kaj fruktodonaj interŝanĝoj kun esperantistoj kaj aliaj de la FISAIC kaj UAICF.

Pri la FISAIC kunveno mi ne partoprenis, ĉar mi ne estis sendita kiel reprezentanto.

Bruno HENRY



# ➤ Internacia Junulara Kongreso



- La fizika IJK denove okazis en Nederlando kun la temo: "Klimata Krizo".
- Aliĝis 288 homoj el 50 loĝlandoj.
- La IJK donis multe da spaco por organizoj por daŭripoveco kaj klimata justeco;
- Okazis du KdE-subvenciitaj trejnadoj kun po 20 partoprenantoj.

## ➤ June kaj kune: la muzikalo



- TEJO ankaŭ sukcese kunmetis muzikalon, titolitan "June kaj kune" kaj prezentitan dum la 78a IJK en Nederlando;
- La muzikalo estis giganta kunlabora iniciato de 30+ junuloj en kaj ekster Eŭropo;
- Ĝi estis subvenciita de Erasmus+ kiel internacia agado de TEJO

## ➤ Strategia Plano 2021-2025

**Ekde 2020, por gvidi la direkton de TEJO en la venontaj kvin jaroj, la Estraro kaj ĝiaj kunlaborantoj kunmetis kvin-jaran Strategian Planon:**

- La SP estas dividita en kvar ĉefaj sekcioj: Tutmonda, Esperantista, Junulara, kaj Organiza, facetitaj laŭ niaj kernaj ecoj: tutmondeco, Esperanto-orientiĝo, junular-orientiĝo kaj organizaj temoj.
- La Realigplano, kiu estas aparta, pli konkreta ĉiujara laborplano de la Estraro, estas bazita laŭ la spirito kaj enhavo de la SP.

### > La SP 1: Tutmonda koncernas la ĉefajn punktojn:

- starigo de egalecplano pri la kernaj agadoj de TEJO, kun fokusiĝo pri tutmonda reprezentado kaj alireblo al kongresoj;
- regula komunikado kun kaj helpado al Landaj kaj Fakaj Sekcioj;
- starigo, ekfunkcio kaj daŭripovigo de tutmonda Mentora Programo en almenaŭ tri kontinentoj;
- starigo de tradukteamo por TEJO-kanaloj kaj TEJO-komunikadoj taŭgaj por naciaj lingvoj;
- planado por la estonteco pli tutmonda kaj daŭripova

### > La SP 2: Esperantista koncernas la ĉefajn punktojn:

- kontribuado al la disvastigo de Esperanto pere de kolektado kaj alirebligo de instrumaterialoj, varbmaterioj en multaj lingvoj;
- pli vigla kaj regula uzado por sia komunikado de ekzistantaj kaj novaj rimedoj, precipe sociaj retoj kaj videoj;
- konsciigo de junuloj pri la Esperanta kulturo, kaj subteno de la Esperanta kulturo kaj kunlaboro kun aliaj organizoj kiel ILEI;
- plifortigo de la Esperanta komunumo per regulaj retaj kaj ne-retaj iniciatoj kun aparta atento al novuloj

### > La SP 3: Junulara koncernas la ĉefajn punktojn:

- aktiva engaĝiĝo en junularaj organizoj tutmonde;
- kreado de glate funkcia kunlabora strukturo por niaj junaj membroj;
- kreado de ebloj kaj lokoj, por ke TEJO-membroj povu partopreni politikajn diskutojn kaj konektiĝi al gvidantoj pri sia vizio por la tutmondaj socio kaj junularo



**Prezidanto de TEJO:  
Léon Kamenický**



## ➤ Kiel vi povas helpi TEJO-n?

### Organizi iniciatojn por & per junuloj


Ni ĉiam organizas eventojn, sed ĉu ili estas alireblaj kaj taŭgaj al junuloj? Tion ni pripensu en nia organizado.

### Subteni la junulojn en via lando

Subtenu la (re)aktivigon de la landa junulara movado en via lando per ĉiaspeca helpo: finance, materie, kapablige...

### Iĝu Patrono kaj donacu al TEJO

TEJO havas okazojn, ofte rete, en kiuj vi povas videbligi vin kaj partopreni en la diskuto kaj decidfarado!



## 79a Internacia Junulara Kongreso

Lignano Sabbiadoro, Italio

5-12 aŭgusto 2023

## KANTO-PARADO en la 9a de novembro

Ni ricevis informojn pri la Kanto-parado, kiu okazas ĉiu-monate.



**Ricevis la unuan premion 6) Sven: 3:03 Vagadi Sencele – Ĵomart kaj Nataŝa**

<https://www.youtube.com/watch?v=WrnueU6UvHk>

**Proponoj dum la 26-a Kanto-Parado je la 09.11.2022:**

- 1) Pia: 2:53 Ĉu vi volas danci? – ĵOmO <https://www.youtube.com/watch?v=-KBkec3Smsw>
- 2) Marcelin: 3:30 La amikoj – Chris Freddy Pendeki <https://www.youtube.com/watch?v=6q3l8hotwpE>
- 3) Axel: 3:06 Ebrio – Maciej Bogumił Nerkowski + Koruso kaj Orkestro de Podlaĥia Operejo kaj Filharmonio (Teksto: William Auld) <https://www.youtube.com/watch?v=3nTPNWlloIQ>
- 4) Evelina: 2:49 Ekvinokso – Ensemblo Ekvinokso <https://www.youtube.com/watch?v=ugCe1rlbh5A>
- 5) Paŭlo: 3:15 Parto de mi (Katy Perry / Esperanto-versio) - Cristina Casella <https://www.youtube.com/watch?v=2l2wtiq1W7o>
- 6) Sven: 3:03 Vagadi Sencele – Ĵomart kaj Nataŝa <https://www.youtube.com/watch?v=WrnueU6UvHk>
- 7) Nelson: 5:13 Esperantisto – Manŭel [https://www.youtube.com/watch?v=\\_GsZpbWjICc](https://www.youtube.com/watch?v=_GsZpbWjICc)
- 8) Inge: 3:09 Amsterdam' - La kompanoj (Jacques Brel) <https://www.youtube.com/watch?v=4tldjroxdUk>
- 9) Heinz: 4:42 Drag Queen – Kore <https://www.youtube.com/watch?v=-41huOEKWBU>

Teksto "Vagadi sencele"

Finiĝis laboro kaj estas vespero  
Necesas jam hejmen iri  
Sed mi hodiaŭ promeni preferas  
Delonge mi tion deziris

Por tempo nelonga problemojn forgesi  
Sidante sur benko sole  
Kaj ne rapidi ien sukcesi  
Iri kien mi volas

Vagadi sencele ĝis nokta mallumo  
Agordi animon minore  
Kaj foliumi kiel albumon  
Foliojn de mia memoro

Kaj mian doloron ne povos kuraci  
Eĉ tia ĉarma vespero  
Mi scias, mi scias, anim-trankvilecon  
Mi trovos somere, somere

Mi morgaŭ revenos al miaj problemoj  
Sed dume mi estas libera  
Nerapidante duope promenatas  
Mi kaj mia espero



Rezultoj kaj statistikoj de la voĉdonado estas videblaj ĉi tie:  
<https://pollunit.com/de/polls/ymho1cqvr0pebxfj9pg>

<https://pollunit.com/de/polls/mho1cqvr0pebxfj9pg/evaluations>

Venkintoj post la voĉdonado (30 partoprenantoj) kaj venontan fojon denove ĉeestos:

1-a rango kun 39 poentoj: Vagadi Sencele – Ĵomart kaj Nataŝa

2-a rango kun 31 poentoj: Esperantisto – Manŭel

Ĉe [https://eventaservo.org/e/RB-09nov22-26a\\_Kantoparado](https://eventaservo.org/e/RB-09nov22-26a_Kantoparado) eblas trovi la ligojn por ĝui la kantojn kaj partopreni venontajn voĉdonadojn.

## OMAĜO al Claude Nourmont

Invititaj de Brian Moon, pluraj dekoj da familianoj kaj samideanoj kunvenis, la 22an de oktobro, en Luksemburgo por omaĝi al Claude Nourmont, lia edzino forpasinta la 25an de februaro.

Pluraj ĉeestantoj elvokis ŝian multegan aktivadon en la Esperanto-movado kaj aldonis kelkajn anekdotojn.

La omaĝo tute ne estis malgaja, ĉar ne nur ĝi rememorigis agrablajn momentojn de la vivo de Claude, sed ĝi ankaŭ permesis al multaj ŝiaj geamikoj kaj familianoj venintaj el Britio, Francio, Belgio, Germanio, Luksemburgio trovi aŭ ekkoni sin en bona etoso,

Kaj la fotoj bukle projekciataj de Brian sur la granda ekrano ŝajnis, ke ŝi vive partoprenas la kunvenon.

J.L.T.



***Cher ami espérantiste.***

***J'ai le plaisir de vous annoncer que l'on peut dorénavant lire et télécharger gratuitement la plus récente version de mon petit roman uchronique intitulé "l'incroyable aventure de la mission Morestin, où comment on évita une guerre mondiale en 1914".***

***<http://eric.coffinet.pagesperso-orange.fr/MORESTIN-1914.html> <http://eric.coffinet.pagesperso-orange.fr/Morestin-1914.pdf>***

***Mon ouvrage est un clin d'œil au dernier roman des "Voyages extraordinaires" de Jules Verne. Peu de temps avant sa mort en 1905, celui-ci travaillait sur un projet de roman intitulé "Voyage d'études", où l'espéranto devait jouer un rôle central. Sur la base de ces notes et sous le nom de son père, Michel Verne publia en 1919 un ouvrage intitulé "L'étonnante aventure de la mission Barsac" et dans lequel toute référence à l'espéranto avait disparu.***


***Mû par la nostalgie d'un monde tel qu'il aurait pu advenir sans l'apocalypse de la première guerre mondiale, j'ai rédigé cet hommage à l'écrivain qui berça mon enfance pour rappeler aux jeunes générations ce que fut le "monde d'hier" de la "Belle Époque" et de ses rêves.***

***Je vous souhaite une agréable lecture et vous invite à la faire partager si vous le désirez.***


***Dr. Éric Bernard COFFINET***

***P. S. : la version en espéranto est éditée par la Flandra Esperanto-Ligo.***

***<http://retbutiko.be/ero/avmo?ero=avmo>***



Huile sur toile intitulée "Pour la Patrie", peinte en 1887 par Victor Prouvé (1858-1943) et photographiée en 2014 par G. Garitan.

<b>Espéranto France-Est</b> http://esperanto.france.est.free.fr				<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio</b>	
<b>La Informilo</b>		Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>		Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>	
<b>Rédaction:</b> <b>Redaktoro:</b>		Edmond Ludwig kaj André Grossmann		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:		Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci		un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre	
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.					

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto <i>Président</i> kaj Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	09.86.38.78.61	andreo.ag18@sfr.fr
Aliaj komitatanoj  <i>Assesseurs</i>	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36 06 76 54 77 78	liliber54@yahoo.fr
	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinelcolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello54@gmail.com
	S-ro Gilbert STAMMBACH	06 87 40 01 16	gilbert.stammach@gmail.com
	S-ro Joël FONTAINE	07 82 43 02 48	joel.fontaine@jfon.fr
	S-ro Bruno HENRY		esperanto.bhenry@laposte.net

<b>Abono al La Informilo</b> →	19 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <i>Abonnement à La Informilo</i>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>		← <i>Paiement par chèque au nom de</i>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>		← <i>Paiement par virement au compte</i>
Per internacia ĝiro →	IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Esperanto-eventoj	15. Libroservo + Libroj	<b>ISSN 0291 6037 trimestriel</b> <b>N° CPPAP : 0409 G 83517</b> Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle <b>Espéranto France-Est</b> MJC PhiJippe Desforges 27 rue de la République <b>54000 NANCY</b> Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b> Rédacteur provisoire: André Grossmann Dépôt légal : <b>30 septembre 2013</b> <i>Imprimé par l'imprimerie Sprenger</i>
2. Samideanoj deĵoras ĉe budoj	16. Enigmo + humuraĵoj	
3. IFEF en Bischheim	17. Turismi per Esperanto	
4. TEJO-kongreso	18. Intergrupa Esperanto-tago	
5. TEJO-kongreso	19. FAME-premio en Aalen	
6. Kanto-parado	20. Zamenhof-festo Luksenburgio	
7. Omaĝo al Claude Nourmont	21. Zamenhof-festo en Freiburg	
8. Komitato kaj enhavo-listo	22. Zamenhof-festo en Freiburg	
9. Angulo de la prezidanto, retoso	23. Azia kongreso en Koreio	
10. Jean Rostand, milito kaj paco	24. Luminesk en Heibronn	
11. Printempa Staĝo en marto	25. Luminesk en Heibronn	
12. Printempa Staĝo en marto	26. Luminesk en Heibronn	
13. Jam la 200a, Kernpukto	27. Luminesk en Heibronn	
14. Libroservo	28. Nia foto-paĝo	



## Estimataj gesamideanoj,

## ANGULO DE LA PREZIDANTO



Kiam proksimiĝas la tempo de la angulo, en kapon de prezidanto venas aŭ blanka truo aŭ tro da temoj por la disponebla spaco! Ĉi-foje mi spertas la duan situacion. Do mi elektas du temojn, kiuj ŝajnas al mi la plej oportunaj hodiaŭ.

Unue mi atentigas pri io, kio kutime ne tiklas nin: la numeron de nia revuo.

Hodiaŭ n° 200!

Tio signifas, ke nia regiona trimonata revuo aperas, regule, de post duonjarcento!

Dum 50 jaroj, ĝi donis informojn, ne nur pri regionaj eventoj sed ankaŭ pri Esperanto en la tuta mondo.

Al ĝi kontribuis multaj samideanoj, sed hodiaŭ, mi deziras omaĝi precipe al du el ili, Unue al tiu kiu, de la unua numero, prizorgis ĝiajn redaktadon kaj eldonadon: nia kara **Pol Denis**, bedaŭrinde subite forpasinta la 21 an de novembro 2013, post eldonado de numero 163.

Due al **André Grossmann**, kiu reprenis la taskon de la numero 164 ĝis nun. Verdire, kiam Pol forpasis, mi opiniis, ke la Informilo pereos kun li. Kaj mi estis vere mirigita, ke André sukcesis daŭrigi la eldonadon. Sciante, kiom nia amiko jam kontribuis al Esperanto-movado per lia agado en la grupo de Mulhouse, en TAKE kaj EFE (librotendado, retejstrado), kaj per lia partopreno en multaj eventoj, lokaj, regionaj kaj eksterlandaj, mi povas nur diri mian admiregon kaj dankegon!

Dua punkto: okazos ĉi jare nia kutima printempa regiona staĝo post trifoja nuligo pro la pandemio, Post interesa, plur-opinia debato, ni finfine decidis ĝian organizadon malgraŭ la nuntempaj ne kuraĝigaj cirkonstancoj, kiuj laŭ ilia evoluo, pli malpli

malhelpas: pandemio, milito en Ukrainio, vetero, sociaj movadoj!

Ĉu finfine vere necesas investi tempon kaj riski monon en tia evento?

Mi konstatas, ke multaj el ni, post longa sindonemo al la movado iom seniluziigis pro la neatingo de la unuaj celoj. Kaj foje ankaŭ al mi venas ioma malkuraĝiĝo.

Ĉu tamen ni devas rezigni?

Mi ankaŭ konstatis pasinte, ke ĉiam, kiam ni entreprenis ion, malgraŭ ofta streĉiĝo, ni ankaŭ entuziamiĝis dum la preparado, kaj ni ĝuis plezuron kiam ni atingis la celon eĉ se ĝi aspektas modesta.

Kaj tio pensigas min pri tiuj, kiuj decidas sur etaj velŝipoj trapasi oceanojn. Kial do en tempo de gigantaj ŝipegoj kaj rapidaj aviadiloj? Ĉar ili estos atingintaj sian propran celon kaj konservos dum siaj tutaj vivoj memoron pri la vojaĝo kaj ties etoso.

Dum niaj “Bavelaj kaj Efaj” semajnfinaĵoj, ni eble kunvenigas nur kvindek da homoj, sed dum tiuj kunvenoj ĉiam regas amikeco kaj veraj interŝanĝoj. (mi aparte dankas al niaj fidelaj bavelaj gesamideanoj, kiuj ĉiam partoprenis niajn ĉi-rejnajn aranĝojn kaj ofte kontribuis al ili). Ĉu finfine tiel ofte okazas similaj internaciaj eventoj en ne esperantistaj rondoj?

Niaj bavelaj amikoj post rezigno en 2020, organizis en 2021 ne tradician semajnfinaĵon, sed “gajan” semajnfinaĵon, kiu alvenigis nur 9 partoprenantojn. En 2021, ili jam sukcesis aliĝigi 25 partoprenantojn por semajnfino pli modesta ol kutime, sed kun turisma programo tre interesa, kaj etoso tre agrabla. Verŝajne, ĉi jare okazos aŭtune tradicia bunta semajnfino!

Ankaŭ nia marta semajnfino estos pli modesta ol kutime, sed ĉiu aliĝanto povos alporti kontribuon al ĝia programo kaj tiel riĉigi ĝin!

Ni aŭdacu kaj ni revigligos la regionan movadon!

Jean-Luc

## RETOSO 2022

Retoso estas la reta evento de TEJO organizata de junuloj kaj por junuloj. Ĝi donas al la homoj la eblon amuziĝi, lerni kaj renkontiĝi kun (novaj) amikoj en Esperantujo per la interreto.

Se vi ŝatas amuziĝi, ludi kvizojn, partopreni en prelegoj aŭ diskuttrondoj, aŭ koncertumi: Retoso bonvenigas vin!

La evento enhavas la plej malaĉan programon, tre diversan kaj plenan je koncertoj, atelieroj, prelegoj kaj interagaj programoj.

Retoso estas vere tutmonda evento kaj partoprenebla por homoj ie ajn en la mondo. Ĝi havas programojn en tempoj taŭgaj por homoj en Azio, Ameriko, Afriko, Oceanio kaj Eŭropo.

Ĉi jare Retoso estas organizita kunlabore kun la Virtuala Kongreso de UEA, kaj vi libere povas ĉeesti sesiojn de ambaŭ eventoj – do eĉ pli granda kaj bunta elekto de programoj atendas vin.


Partopreni estas **tute senkosta por la membroj kaj patronoj de TEJO!**

Sendu viajn demandojn al [retoso.tejo@gmail.com](mailto:retoso.tejo@gmail.com).

Se vi uzas Telegram, vi povas jam antaŭĝoji nian grupon ĉi tie.



Jean Rostand (1894-1977) verkis en la jaro 1954 tiujn jenajn definitivajn liniojn pri la realeco de la aferoj :



Jean Rostand (1894-1977) verkis en la jaro 1954 tiujn jenajn definitivajn liniojn pri la realeco de la aferoj :

*"La homa specio pasos for, same kiel pasis la dinosaŭroj kaj stegokefaloj. Iom post iom, la eta stelo, kiu servas al ni kiel suno, perdos sian lumigan kaj hejtan forton ... Ajna vivoformo estos tiam ĉesinta sur la Tero, kiu, malaktuala astro, plu turniĝos senfine en spacoj senlimaj... Tiam, el la plena civilizo homa, aŭ superhoma, malkovroj, filozofioj, idealoj, religioj, nenio restos. En ĉi tiu eta angulo de la universo estos nuligita por ĉiam la bagatela aventuro de la protoplasmo ...*

*aventuro, kiu jam, eble, ŝlosiĝis en aliaj mondoj ... aventuro, kiu en aliaj mondoj eble estos renovigita ... kaj ĉie subtenata de la samaj iluzioj, kreinto la samajn turmentojn, ĉie tiel senseca, tiel vana, tiel nepre promesita de la principo al la fina fiasko kaj senfina mallumo ...*

"sendis Roland PLATTEAU"

### La milito kaj la Paco

Mia filo, la malgranda, ludas per armilo-ludilo,  
Dum la granda trafoliumas "Milito kaj Paco"verkita de Tolstoj  
En TV mi aŭskultas, ke en Ukrainio ĉiuj civitanoj  
Estas alvokitaj al armeo, maljunuloj kaj infanoj, same!..

La granda filo estas deksex-jara  
Mi imagas sur ties freŝaj ŝultroj armilon  
La griza fumo kaj la bruliga aromo de la pulvo  
Ellasas sonojn en la ĉambro, en la korto, kiel kampano!

Plendolora kurento trapasas mian korpon  
Ĉu mi povas konduki mian filon al la milito  
Sur ties delikataj ŝultroj mi imagas fusilon  
Li diras: ne ploru, jen mi estas, fariĝis mi jam viro!

Dum la jarcentoj la Milito diras al la infanoj  
Fariĝi viroj antaŭtempe, ĉar la Milito postulas virojn  
Dum la patrinaj preĝas unuafoje, ke la infanoj  
Dum la milita tempo kresku iom pli malfrue!

poemo de Alma Jaku  
traduko de Bardhyl Selimi el Albanio

Bonjour amis des voix, amis du chant,

C'est du samedi 25 février au samedi 4 mars 2023 que se déroulera notre prochain stage sous la direction de la néerlandaise Rineke HOENS.

Indiquez-nous au plus vite votre intérêt pour organiser au mieux cette semaine de travail (et de détente !) en commun.


Les bulletins d'adhésions sont en cours d'édition. Il y aura quatre périodes d'inscription (plus on s'engage tôt, plus important est le rabais !) jusqu'au 15 novembre, au 10 décembre, au 5 janvier et ensuite. Tarif dégressif également pour le 2-e, le 3-e d'une même famille.

Ambiance internationale, 5 heures de chant par jour, après-midi culture et détente, soirées conférences & jeux.

Concert final.

*Jorgos, Bitu, Annemie, Véro & les autres.*





**ESPERANTO-NANCY-54 kaj**  
  
*France-Est*  
**en amikaj rilatoj kun BAVELO**  
**invitas vin al la :**

**88a Regiona Staĝo de Esperanto la 17/18/19ajn de marto 2023**  
**en Centre de Loisirs d'Art-Sur-Meurthe**  
**36 avenue de la Chartreuse, FR-54510 ART SUR MEURTHE**  
**(N.48.66217° E.6.25104°)**

De post tri jaroj, ni esperis organizi tiun regionan semajnfinojn en Art-Sur-Meurthe, same kiel en 2016. Bedaŭrinde, la finpreta projekto de 2020 devis esti lastmomente nuligata pro la tute ne atendita kovim-pandemio.

Denove, en 2021 kaj 2022, ni preferis rezigni pro la serpenta daŭrado de la malsano.

Ĉi jare, ni decidis spiti la kontraŭajn fortojn kaj realigi la feniksan semajnfinojn, kun iom pli modesta programo.

Nia ĉi-jara regiona staĝo denove okazos en tiu verda kaj trankvila distro-centro je dek kilometroj de la centro de Nancy.

Meze de 11-hektara parko proksima de rivero Meurthe, ni disponos je unu el la 6 konstruaĵoj por laŭplaĉe lerni, babili, ridi, aŭskulti prelegojn, ĝui distran vesperon, rigardi farm-bestojn ... aŭ trafoliumi la 700 titolojn de nia libroservo!

Ni ankaŭ povos manĝi kaj dormi surloke kaj turismi en la ĉirkaŭaĵo.

Sabaton matene, ni vizitos en Saint Nicolas de Port la Muzeon pri kino kaj fotografio: de la Pratempe ĝis nun, sur pli ol 1000m<sup>2</sup>, 3000 objektoj aperos al ni, kaj ni eĉ povos lude eksperimentumi!

**Gravaj novaĵoj por ĉi-jaro:**

1) al la distra vespero ĉi-jare ni ne invitis elstaran artiston (la ĝenerala situacio sana kaj internacia ŝajnas ankoraŭ tro ŝanĝigema!) Ni do proponas, ke ĉiu, kiu deziras, alportu sian ŝtonon per iu spektaklero (kun daŭro de 10 ĝis 30 minutoj), ekz. : skeĉeto, kanzono (j), muzikaĵo, deklamaĵo, magiaĵo. . . Sendu viajn proponojn al [esperanto-nancy-54@laposte.net](mailto:esperanto-nancy-54@laposte.net). Post interkonsento, la kontribuanto povos aliĝi kun favora kotizo (por ĉef-aliĝanto: 22 € anstataŭ 28 € aŭ 41 € anstataŭ 47 €).

2) Krome ankaŭ ne estos unu-sola preleganto por la tuta D-kurso. Ni do invitas volontulojn proponi prelegetojn, kiu daŭrus proksimume unu horon. Same, tiuj sendu sian proponon al [esperanto-nancy-54@laposte.net](mailto:esperanto-nancy-54@laposte.net). Post interkonsento, la kontribuanto povos aliĝi kun favora kotizo (por ĉef-aliĝanto: 22 € anstataŭ 28 € aŭ 41 € anstataŭ 47 €).

Por atingi C. L. A. M. Per urba buso, ekde la stacidomo de Nancy, uzu linion 20, haltejo "Repentir". La busoj kaj la tramo estas senpagaj en la nancia urbaro sabate kaj dimanĉe (ne vendrede).

**Provizora Programo:**

**Vendrede 17-an de marto 2023**

- 17a Akcepto de unuaj alvenantoj
- 19a Vespermanĝo
- 20a Interkona vespero. Por la interesatoj: ebleco viziti la centron de Nancy.

**Sabate 18-an de marto 2023**

- 8a ĝis 9a Matenmanĝo. Akcepto de pliaj alvenantoj
- 9a Vizito al la Muzeo pri foto kaj kino kaj en Saint-Nicolas de Port.
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de pliaj alvenantoj.
- 14a15/14a45 Prezento de la novaj libroj de la Libroservo
- 15a/18a Kursoj A, B, D (prelegetoj)
- 18a libroservo
- 19a Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero: programo nun preparata.
- Knajpo



**Dimanĉe 19-an de marto 2023**

- 8a ĝis 9a Matenmanĝo
- 9a /12a00 Kursoj A kaj B, D:(Buntaj prelegetoj)
- 12a30 Tagmanĝo
- 14a Fino de la staĝo (eble kunveneto de la komitato de Espéranto France-Est.)

**Atentoj:**

- *la nombro de disponeblaj litoj estas limigita: la unuaj respondintoj estos la unuaj servitaj. Se ne plu estos litoj en ĉambroj por unu aŭ du personoj, eble ni povos proponi litojn en plurlita ĉambro, aŭ necesos trovi ĉambron en proksima hotelo.*
- *la centro CLAM ne enmetas tualet-tukojn en la dormo-ĉambrojn: nepre kunportu ilin!*
- *se vi deziras specifan manĝo-menuon (vegetaran, veganan aŭ alian), nepre kontaktu nin antaŭe. Ni informiĝos ĉe CLAM pri la farebleco.*
- *tiu kiu, havas sanajn aŭ financajn malfacilaĵojn por partopreni la semajn-finon, kontaktu nin, eble ni trovos solvon!*

Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon  
**La Informilo** dum unu jaro.

ALIGOJ		Restado en ĉambro por:	du personoj aŭ pli	unu sola persono
Ĉef-aliĝanto abonanta "La Informilo"-n aŭ loĝanta ekster Francio	28 €	Unu tranokto sen matenmanĝo	25 €	29 €
Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilo"-n kaj loĝanta en Francio	47 €	Matenmanĝo sen tranokto	4 €	4 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	22 €	Tag- aŭ vesper-manĝo sen trinkaĵo kaj sen tranokto	12 €	12 €
Junulo inter 10 kaj 25 jaroj	15 €	1 tranokto + 1 maten-manĝo	29 €	33 €
Infanoj malpli ol 10 jaroj	4 €	1 unu tranokto + maten-manĝo + 1 manĝo sen trinkaĵo	35 €	39 €
		1 tranokto + maten-manĝo + 2 manĝoj sen trinkaĵo	40 €	44 €

### Aliĝilo por la 88a Regiona Staĝo de Esperanto la 17 / 18 / 19ajn de marto 2023 en ART-SUR-MEURTHE

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Malpli ol 25	Aliĝ- kotizo	Elektitaj kursoj
1		ĉef-aliĝanto			
2		kun-aliĝantoj			
3					

Adreso

Telefon-numero(j):

Ret-adreso:

Mi pagas (minimume la aliĝkotizon) jenan sumon: €

- per franca ĉeko al Esperanto Nancy 54  
 per franca poŝta ĝiro al Esperanto Nancy 54 CCP 4786-82 J NANCY  
 per "Sepa" ĝiro al Esperanto Nancy 54

IBAN FR49 2004 1010 1004 7868 2J03 140 BIC PSSTFRPPNCY

Anoj de landoj ekster Eŭrolandaro povas pagi ĉion surloke

**Krom grava evento, la aliĝ-kotizo ne estas repagebla!**

Kompreneble la partoprenantoj devos respekti la regulojn validajn dum la datoj de la staĝo rilate la lukton kontraŭ la kovim-pandemio!

Nombro da manĝoj kaj da tranoktadoj en C.L.A.M.	Vendrede 17	Sabate 18	Dimanĉe 19
Matenmanĝo			
Tagmanĝo			
Vespermanĝo			
Tranokto(j) en du-aŭ plur-lita ĉambro			
Tranokto(j) en ĉambro por unusola persono			
Vizito al la muzeo pri kino kaj foto (4 €)			

**KURSOJ** (kurslibro aĉetebla surloke eble estos necesa)

A: Komencantoj

B: Paroliga kurso

Gvidanto: Edmond Ludwig

D: Prelegoj

**Daŭre aktualigitaj informoj ĉe:**  
<http://esperanto.france.est.free.fr>

**Pliaj informoj ĉe**esperanto-nancy-54@laposte.net  
poŝ-tel. 00.33.(0)6.77.90.49.41

La surloka organizado estas prizorgata de la grupo de Nancio Esperanto Nancy 54 estas asocio laŭ leĝo de 1901 RNA N° W543008998

**Bonvolu sendi vian aliĝilon****- aŭ per-poŝta letero al:**S-ino Micheline Colnot  
15 rue de Lavaux  
54520 LAXOU

(Se vi antaŭ-pagas per franca ĉeko al Esperanto Nancy 54, kunsendu ĝin).

**- aŭ per ret-mesaĝo** al [esperanto-nancy-54@laposte.net](mailto:esperanto-nancy-54@laposte.net).

Ni deziras disdoni liston de partoprenantoj al ĉiuj staĝanoj. Se vi akceptas esti sur tiu listo, ni bezonos vian konsenton. Forstrekite la nevalidan deziron. Mi akceptas, ke la ĉi subaj jesaj elementoj aperu en la listo. Subskribo:

Nomoj: jes ne

Poŝta adreso: jes ne

Ret-adreso: jes ne

Telefono: jes ne

## Jam la 200a numero de La Informilo

### Oktoebro 1950. Aperis la dua numero de “La Informilo” .

- Oni preparu la novan laborjaron laŭ la admonoj de UEA, kiu decidis organizi en la tuta mondo Esperanto-semajnon, inter la 14a kaj la 21a de oktobro. La bulteno donas konsilojn, UFE povas helpi per eldono de materialo: afiŝoj (po 2f), flugfolioj (100 kostas 50f), glumarkoj, poŝtkartoj. Oni malfermu novajn kursojn ĉie kie eblas.
- Mortis pioniro de Esperanto, **Marcel Laignier**. Li naskiĝis en Reims, kiel 10-jara knabo, li konatiĝis kun Esperanto (en 1891). Li fondis en Reims la unuan Esperanto-grupon. Poste li helpis rekrei la grupon de Nancy post la unua mondmilito. Pro longa malsano, li ne povis labori kiel li deziris por Esperanto. Li fariĝis honora prezidanto de la nancia grupo. Li mortis 69-jaraĝa.
- La kunvenoj de la esperantista grupo de Nancy okazis la 3ajn merkredojn de ĉiu monato en trinkejo de la strato de “*Mon Désert*” (tre proksime de la nuna junular-kulturdomo). Kaj aliaj kunvenoj, sub la nomo “*cercle Espéranto*”, estis komunaj kun la laborista grupo (SAT) la 1ajn ĵaŭdojn de l'monato.
- 2 kursoj okazis en Nancy: en la junuldomo, la SAT-gvidanto **Petro Louis** gvidis ĉiu-merkrede kurson por gejunuloj. La junuldomo (tiam la unua kaj sola en Nancy) situis 36 cours Léopold. (Mi mem konatiĝis kun tiu grupo tre baldaŭ post mia alveno, kaj mi komencis tie praktiki parole la lingvon). Dua kurso, okazis en teknika lernejo, 6 rue Clodion. Ĝin gvidis sinjorino **Blanche Fondrillon**, lernejestrino kaj edzino de la presisto de la “Informilo”. Tria kurso estis antaŭvidita en la por-instruistina seminario.
- La federacia sekretario, **Jean Chapellier**, bedaŭris ke lia alvoko en la unua “Informilo” restis sen eŝo. Kaj li petegis ĉiujn esperantistojn de nia regiono reagi per sugestoj, kritikoj, kaj ĉefe informoj pri la Esperanto-vivo en la diversaj urboj de la federacio.
- “La Informilo” rekomendis la antaŭmendon al UFE de la nova libro “Retoriko” de profesoro Ivo Lapenna, eldonota novembre. Prezo: 500 tiamaj frankoj. Ĝi rekomendis ankaŭ la aĉeton de “*feuilletés encyclopédiques de documentation espérantiste*”, treege grava dokumentaro franclingva pri ĉio, kio koncernas Esperanton. Prezo de la 11 aperintaj kajeroj: 1500fr; abono al venontaj kajeroj: 500fr.
- “Heroldo de Esperanto” proponis al novaj abonantoj por 1951 la senpagan ricevon de la 6 lastaj numeroj de 1950.
- La dua “Informilo” finiĝis per proverboj:
  - *Espero kaj pacienco kondukas al potenco*
  - *Kie regas la forto, tie rajto silentas*
  - *Neleĝe akirita ne estas profita*

En la [retpaĝo](http://punkto.info) <http://punkto.info> kuniĝas podkasto kaj aliaj retaj projektoj. Preskaŭ ĉiusemajne aperas nova epizodo de la podkasto kern.punkto pri io ajn en Esperanto, sed ne pri Esperanto. Jen la lastaj temoj:

· [KP204 Pigmentoj - La mistera eliksiro de pentrado](#)

Pliaj epizodoj vi povas trovi en la arkivo: <https://kern.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <https://kern.punkto.info/tuje/>

Neregule aperas la epizodoj de la podkasto movada-vid.punkto pri Esperanto-movadaj temoj. Jen la lastaj temoj:

· [MvP024 Lingvolernado - Kiel instrui lingvojn al infanoj](#)

Pliaj epizodoj vi povas trovi en la arkivo: <https://movada-vid.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <http://movada-vid.punkto.info/tuje>

[Julia](#)



# El nia libroservo

## Informoj

Bonan novan jaron al ĉiuj legantoj !

Se la regiona semajnfina staĝo povos okazi en Art sur meurthe la 17/19ajn de marto 2023, tiam la tuta libroservo atendos vin surloke.

Informoj aperos en la retejo <http://esperanto.france.est.free.fr>

Ĝis baldaŭ

Jean-Luc Thibias

libroservo.efe@laposte.net



## Nove alvenintaj libroj



①



②



③



④



⑤



⑥

1. **Antaŭ printempo**, Romano, **Stefan Žeromski**, *Durdevac*, 2018, 248 p. 27 €.  
Vidu la apartan recenzon de Edmond Ludwig,
2. **Ĉielarko**, Poezio, **Julio Baghy**, *Durdevac*, 2018, 82 p. 9,90 €.  
Vidu la apartan recenzon de Edmond Ludwig,
3. **La vagabondo kantas**, Poezio, **Julio Baghy**, *Durdevac*, 2018, 136 p. 14,10 €.  
Vidu la apartan recenzon de Edmond Ludwig,
4. **Ho, tiuj fremduloj!** Teatraĵo (opereto), **Feliks Hiller**, *Durdevac*, 2018, 74 p. 7,50 €.  
Momente ne disponebla. Vidu la apartan recenzon de Edmond Ludwig,
5. **Landoj de l'Fantazio**, Romano, **Teo Jung**, *Durdevac*, 2018, 276p. 30 €.  
Utopia romano, kiu satiras la okcidentan socion de antaŭ cent jaroj. (el retejo de U. E. A.)
6. **La tempo de la kaprinoj**, Romano, **Luan Arif Starova**, *Durdevac*, 2022, 120 p. 18 €.  
Historia kaj alegoria, fantasta kaj folkloro, la romano situas tempe en la postmilita rekonstru-periodo de la jugoslavia Makedonio (el retejo de UEA)

### Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon
  - perpoŝte al: Libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR-54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
  - per ret-poŝto al "**libroservo.efe@laposte.net**" - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54
2. Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:
  - franca ĉeko je "**Esperanto France Est**" sendita al la supra adreso
  - poŝta ĝiro al "**Esperanto France Est**" CCP 0 1997 72W NANCY"
  - interbanka ĝiro al "**Esperanto France Est**" IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC PSSTFRPPNCY.

<i>Mendilo</i>		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En	la	Subskribo:

**ANTAŬPRINTEMPO de Stefan Žeromski**  
(Ĝurdevac Ŝmidnik Lublin Bjalistoko 2018)  
Tradukis Tomasz CHMIELIK

Csarú Baryka, alinome Cejarĉjo, vivis antaŭ la Unua Mondmilito kun siaj gepatroj en Baku ĉe la Kaspia maro en pola kolonio, kiu esperis trovi tie prosperon pro la malkovro de nova energifonto: nafto! La patro laboris tie kiel supera oficisto en naftokompanio. Sed subite li estis vokita al la militservo kiel rezervo-oficiro. Kaj la adoleska Cejarĉjo troviĝis sola kun la patrino, kiu klopodis eduki kaj nutri lin malgraŭ la malfacilaĵoj kaj la neobeemo de la filo.

Cejarĉjo aliĝis al la bolŝevista partio malgraŭ la provoj de lia patrino malhelpi tion. Baldaŭ la patrino forpasis pro mizero. Cezarĉjo kredis je la revolucio kaj sin engaĝis pli kaj pli, sed tamen li daŭre esperis revidi sian patron, sed longe li restis sen novaĵoj.

En 1919 komenciĝis nova milito inter poloj kaj rusoj. Tiam li decidis migri al la pola regiono en kiu originis lia patro. Li estis ja vidinta, ke la bolŝevistoj ne kreis paradizan reĝimon en Rusio.

Dum lia migrado al okcidento en nekredeble aĉaj

kondiĉoj li tamen retrovis sian duonmortan patron. La fervoja veturado ege malfacilis, kun daŭraj kontroloj de la bolŝevistoj. Helpis al ili iu pastro malgraŭ la minaco de mortpuno kontraŭ helpantoj de forfuĝantoj.

Dum la vojaĝo la patro rakontis al li pri la bela paradiza vivo en Pollando, kie oni vivas en vitraj domoj! Sed baldaŭ la patro mortis. Li daŭrigis la vojaĝon, sed kiam li atingis la polan teritorion, li konstatis, ke temis ĉefe pri malparadizo. Mizeregaj estis la judaj kvartaloj.

Kiam li rekomencis studi medicinon en Varsovio invadis la rusaj bolŝevistoj kaj Csarú soldatiĝis kaj partoprenis en la venko de Pollando. Li iĝis sekretario de grava politikisto kaj tiu posteno lin partoprenigos al la kreo de la pola respubliko. Sed daŭre li malkontentas kaj deziras plibonigon!

Vi mem malkovros lian amikaron kaj liajn aventurojn!

Mi nur aldonu, ke tiu libro estas kvazaŭ historia dokumentaro pri tiu epoko, sed la ĉefa rolanto antaŭ ĉio interesiĝas pri la sorto de la simpla popolo.

E. L.

**Ho, tiuj fremduloj! Opereto de Feliks HILLER (Dua eldono)**  
(Ĝurdevac Ŝmidnik Lublin Bjalistoko 2018)

Tomasz Chmielik reredaktis la tekston de tiu unuakta opereto, kiu aperis en la eldonejo J. Ŝapiro en 1923 en Bjalistoko. Ne ofte sursceniĝis operetoj en Esperantujo. Tiu ĉi reaperas denove eĉ kun musiknotoj, do prezentopreta!

Pro la aktuala streĉa, kriza mondsituacio la titolo

emigas pensi pri kontraŭfremdula verko neatendita en esperantista medio. Trankviligu vin! La afero multe pli leĝeras! Temas kompreneble nur pri amaferoj kaj ĵaluzo, kio ja estas plejofte temo en operetoj. Kiom da fojoj tiu verko estas sursceniĝita aŭ estos sursceniĝata? Eble iu leganto povos kompletigi la informon de la lasta kovrilpaĝo.

E.L.

**La vagabondo kantas Julio Baghy JUBILEA ELDONO**  
Ĝurdevac Ŝmidnik Lublin Bjalistoko 2018

Ĉiu iom instruita esperantisto konas la satiran poemon de nia ege populara poeto Julio Baghy *Estas mi esperantisto!* Ankaŭ ĉi poemo troviĝas en la jubilea eldono de *La vagabondo kantas*. Belaspektas la libro kun 105 versaĵoj de Julio Baghy. Certe multas la poemoj de bardo, kiu amas la naturon, la amon, sed ne la ne ĉiam pacajn interhomajn rilatojn. La bono ne ĉiam venkas! Ankaŭ pro la militoj li pesimismas.

Sed nia tra l'mondo vojaĝinta bardo plejofte venkigas la amon, ekzemple en la poemo *Memoro pri l'Pariza*

*Majo*. Tiu poemo neniel rilatas kun la majaj parizaj revoluciaj tagoj en 1968, sed ĝi ebligu memori al vi la daton de la forpaso de Julio Baghy: 1967.

Ankaŭ poetoj kverelas! En la poemo *Mi neniam volis esti...* li respondas al unu el la poetofratoj, kiu riproĉis al li la neplenan respekton de la reguloj de la klasika versfarado!

Nu! Forgesu ĉi poetkverelojn, kaj pluku la multajn belaĵojn!

Sed ne forgesu: sen la akuzativo vi malfacile komprenus la versaĵojn! Dankon Zamenhof!

Edmond LUDWIG

**Ĉielarko (Antologio de fabeloj originale en versoj reverkitaj) Dua eldono**  
Ĝurdevac Ŝmidnik Lublin Bjalistoko 2018

Pri ĉi kolekto de legendoj el diversaj landoj Baghy mem skribas en la antaŭparolo: Min incitis la penso doni internacian antologion de fabeloj, verkitan en lingvo internacia tiel, ke ĝi havu tian valor-pluson, kian

originala kreaĵo havas por nia Esperanto-Literaturo.

Li eĉ agnoskas, ke li la fabelojn transskribis aldonante la frukton de lia senlima fantazio!

Vojaĝu fabele, verse tra la mondo!

Edmond LUDWIG

## Ni lernu per enigmo kaj humuraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

**JG**

### MISA EKZAMENO

Henriko konsultas sian kuraciston.

D-ro Klastro: *"Larĝe malfermu vian buŝon, Henriko"*.

La kuracisto ekzamenas la gorĝon de Henriko per poŝ-lampeto.

Subite, d-ro Klastro diras per tremanta voĉo: *"HO VE!"*

Henriko panikas: *"Kio okazas, doktoro!? Ĉu estas seriozaĵo!? Diru malkaŝe!"*

D-ro Klastro: *"La piloj de mia poŝlampeto eluziĝis..."*

### KIEL KUIRI KOLBASOJN

Estas belega tago, la unua tago de la somero

Eta Alano vokas sian patron: *"Paĉjo, hodiaŭ mi-mem kuiros la vespermanĝon!"*

Henriko: *"Ĉu vi? Kion vi preparas?"*

Alano: *"Krad-rostitajn kolbasetojn"*.

Henriko: *"Hm, ĉu vi ne estas iom tro juna por tia tasko?"*

Alano: *"Ĉio en ord', paĉjo. Panjo ekfajrigis la krad-rostilon kaj metis la kolbasetojn sur ĝin. Ŝi diris ke mi voku ŝin kiam ili estas finkuiritaj, kaj ŝi venos por forpreni ilin."*

Henriko: *"Jes, mi vidas ke VI kuiros"*.

Alano: *"Mi havas nur unu demandon."*

Henriko: *"Kio estas?"*

Alano: *"La kolbasetoj fariĝis tute nigraj. Ĉu vi supozas, ke ili estas fin-kuiritaj?"*

*"Diru, amiko, kial vi ĉiam venas kun via edzino ĝuste en tiun ĉi noktomanuŝojn? Ĉu tiel plaĉas al vi ĉi-tie? - Tute ne, sed tio ĉi estas la sola lokalo, kiu ankoraŭ estas malfermita, kiam mia edzino finfine jam estas vestita"*.

### HORIZONTALA:

1. Insul' en la Hinda Oceano.
2. Egipta bird'. Nov-zelanda papag' kun tre longa beko. Subjunkcio.
3. Aŭgurad' surbaze de la linioj de mano.
4. Tio, kio karakterizas ion. Trinkujo por teo aŭ kafo.
5. Orkidac'. Oratorio sen vokaloj.
6. Sennacieca Asocio Tutmonda. Kapo de ikonoklasto. Numeralo.
7. Aneksa suplement' de revuo.
8. Restaĵo de disfalinta konstruaĵo. Centro de akso.
9. Larm'. *INVERSE*: batalveturilo.
10. Frakci', kies numeratoro estas unu. Kondamn' je la Inferno. Regnokodo de Brazilo.

### VERTIKALE:

1. Instrumento por observi tre malgrandajn objektojn.
2. Genr' de pinglo-arboj. Centro de eraro. Luno sen vokaloj.
3. Estro de oficejo, gazeto, ktp...
4. Ar' da membrojn por komuna celo. Grava krim'.
5. Ag' de iu, kiu ŝanĝas la formon.
6. Kapo de akacio. Administrant' de bieno.
7. Stat' de la konscio. Onklo, tute konfuzita!
8. Slava monark'.
9. Helpo. Pint' de terlango.
10. Tononomo. Muzika ensembl'.

*"Kara najbaro, kial vi estas tiel malgaja?"*

*- Forkuris kaj malaperis mia hundo.*

*- Ĉu valoras ekscitiĝi tiel pro unu hundo? Vi ja estas pli maltrankvila ol kiam forkuris de vi via edzino...*

*- Kompreneble, ĉar ŝi ne havas kvar medalojn el internaciaj ekspozicioj!"*

Geedzoj foriras libertempi. En la stacidomo la edzo ŝvitegas pro amaso da valizegoj kaj penegante li murmuris:

*"Ni estus devintaj kunpreni ankaŭ la pianon.*

*- Ne diru stultajn ŝercojn!"* - koleras la edzino.

*"Tio estas nenia ŝerco. Sur la piano nome kuŝas niaj trajnbilettoj..."*

### **SOLVO de KVE 199:**

#### **Horizontale :**

- 1.TEMPERATUR. 2.UNIO. SERI. 3. BILDRAKONT. 4.ETIKET. ROM. 5.TA. ABI. 6. KAPSAK. 7.UBAT. AM. RO. 8.LAS. ANATOM. 9.OKTO. TREMO. 10.ZORGO. SKIP.

#### **Vertikale :**

- 1.TUBERKULOZ. 2.ENIT. ABAKO. 3. MILITPASTR. 4.PODKAST. OG. 5.RE. 6. ATAKANT. 7.ASK. MARS. 8.TEORIO. TEK. 9. URNO. KROMI. 10.RITMO. OMOP.



## TURISMI PER ESPERANTO

Jam de 2017 en Venecia regiono, en aŭgusto, turistoj vizitas lokajn urbetojn kun helpo de lokanoj **per esperanto**. Tiu evento estas ligita al projekto Paralela Universo, kiu arigas esperantistojn ĉie en la mondo, la 3an sabaton de aŭgusto.

Ĉi-jare en Nord-Orienta Italio tio okazis en la urbeto ODERZO en provinco de TREVISO, 25 km de Venecio.

Oderzo naskiĝis kiel vilaĝo de pravenetaj popoloj, nomita Opterg (de la kroata Trg=placo Op: mercado) en la jaro 1000 antaŭ Kristo. Ĝi estas la plej antikva urbo de la regiono Triveneto. Poste en antikva Romo ĝi iĝis Opitergium kaj Oderzo en la itala. Ĝi havas nun 20.000 loĝantojn.

Do turistaj esperantistoj kaj lokanoj renkontiĝis en centro de Oderzo. Ni vizitis la katedralon kaj la episkopan muzeon (la arkeologia muzeo estis fermita pro laboroj). Ĉiceronino tre lerte klarigis ĉiujn pentraĵojn, skulptaĵojn, historion de la urbo dum du horoj. Ni vizitis ankaŭ la Romian Forumon kaj la urbocentron, kiu estas la plej fortikigita urbo de Italio (laŭ nombro de loĝantoj) kaj ni ekvidis la surgrundan analemon (1) Okaze de tiu evento aperis poŝtkarto pri la urbo en Esperanto, kiu estos trovebla ĉe la budo de la katedralo kaj muzeo.

(1) Grunda analemo:

La analemo estas figuro konstruita metante apude la poziciojn de la suno ĉiutage samtempe kaj dum jaro.

De la Tero, la analemo estas formita kiel nesimetria 8, kun unu buklo multe pli malgranda ol la alia. Tiu ĉi formo estas pli-malpli klinita rilate al la horizontalo laŭ la tempo elektita.

Foto de la esperantista grupo antaŭ La Toreson de Oderzo



Dank'al tiu vizito ni decidis enmeti tiun vorton ĉe Vikipedio, kaj listigi urbojn, kie oni povas vidi tion. Ĉu vi scias en kiuj urboj estas aliaj? (Krom Oderzo, Bienne.)

## Planita intergrupa esperanto-tago okazis en Thionville la 10an de decembro 2022.

La ideo estis organizi 1 aŭ 2 foje trimonate, (en diversaj urboj alterne) tuttagan Esperanto-eventon, duone kun kursoj, duone kun alia programo (prelegetoj, anoncoj, babila interŝanĝo) kun kompreneble meze komuna tagmanĝo!

La celo estas allogi membrojn de grupoj, individuoj, kaj se eble novajn interesatojn loĝantajn ĝis 100 km ĉirkaŭe.

Tia tuttago-evento ne celas konkurenci lokajn kursojn nek regionajn semajn-finojn. Ĝi proponas novan ŝtupon, kiu permesos:

- al perretaj lernantoj ekkoni la vivantan movadon kaj perfektigi en parola konversacio,
- al tiuj kiuj ne povas akurate partopreni la lokajn kursojn (pro profesiaj kialoj aŭ pro malproksimeco) sekvi kelkajn horojn da parola kurso,
- al progresantoj ekkoni aŭ retrovi anojn de proksimaj grupoj.

\*\*\*\*

La grupo de Thionville tuj adoptis la ideon kaj proponis organizi la unuan buntan tuttagan Esperanto-tagon.

Bruno Henry preparis programon kaj anoncis la eventon al konataj esperantistoj de la regiono, ankaŭ al samideanoj aperantaj sur "Amikumu". Li enmetis plie anoncon sur la reta informejo "eventaservo.org".

13 samideanoj alvenis do sabaton je la 9a15 en la Domo de la asocioj Raymond Quesnau en Thionville. Tiu Domo permesas al la grupo, kontraŭ jara kontribuo disponi je salono, iam ajn dum la jaro, kondiĉe ke ĝi estu libera je dato dezirata. Ankaŭ disponeblas kuirejo!

Bedaŭrinde ne venis komencantoj, kaj kelkaj junaj samideanoj ne povis partopreni pro profesiaj kialoj.

Tamen la nombro de partoprenantoj estis kuraĝiga, des pli ke krom el Thionville venis esperantistoj de Nancio, Luksemburgio kaj eĉ Germanio! La etoso estis do internacia kaj krokodilado maloftis!

Matene, kiel planite, okazis paroliga kurso surbaze de la kurslibro "Bild-strioj kiel instru-libro" de Michel Dechy. La longan komencan rondan prezenton interrompis la alveno de ĵurnalistino de Moselle TV. Tiu ĉi sin anoncis vendredon vespere je la 20a. Do ne eblis plene prepari materialon por prezenti la lingvon. Tamen ŝi filmis la kurson kaj intervjuis Bruno-n. Raporteto devus aperi sur Mosel.Tv la 15an de decembro. Tiu ĵurnalistino ne estis rekte invitita. Ŝajne ŝi ekciis pri la E° tago sekve al la aperigo de anonco sur eventaservo.org

Por simpligi la preparon kaj malaltigi la kostojn, estis decidite, ke ĉiu kunportu eron de la komuna manĝo, kaj uzos la lokajn kuirejon kaj manĝilaron.

Sinsekvis tre agrabla gastronomia tagmanĝo!

Post la manĝo, realiĝis la bunta programo:

- Daniel Raoult prelegetis pri Kristnaskofesto
- Mi vojaĝigis en Pollando per fotoj de la lando

- Catherine Kremer prezentis la Esperanto-centron de Kvinpetalo
- Brian Moon klarigis, kiuj fenomenoj en la nuna lingvo-uzado plej ĝenas lin.
- Bruno Henry raportis pri la Kulturaj ekspozicioj de FISAIC (fervojistoj) kaj Esperanto en urbo Bischheim (vidu la apartan artikolon!)

Eblis ankaŭ rigardi kaj aĉeti kelkajn librojn de la regiona libroservo.

Kaj la bunta tago finiĝis ĉirkaŭ la 17a.



Gratulojn al la grupo de Thionville pro la bona organizado.

Dankojn al la prelegantoj.

Kaj al ĉiuj venintoj, kiuj per siaj ĉeesto kaj partoprenemo vivigis la projekton!

\*\*\*\*

Ŝajnas, ke ĉiuj estis kontentaj post tiu bunta tago.

Do ni esperas renovigi la eventon, en okcidenta parto de la regiono, komence de la venonta jaro: fine de januaro aŭ komence de februaro (por nekolizii kun la regiona semajnfino esperata je la 17/19ajn de marto).



Povus esti en Metz, Luksemburgio, eventuale en Nancy aŭ en alia loko.

Ĉu tiaj komunaj intergrupaj esperantaj eventoj povus ankaŭ okazi en rejna valo por grupigi dum unu tuta tago samideanojn de Malalta Rejno, Alta Rejno kaj proksimajn samideanojn de Germanio kaj Svislando?

Jean-Luc Thibias

## Solena transdono de la 17-a Esperanto-Kulturpremio de Aalen de la FAME-Fondaĵo por Stimulado de Internaciaj Kompreniloj kaj de la urbo Aalen Sabate, la 22-an de oktobro 2022, je la 18-a horo en la Kulturcentro KUBAA

Al la kantista duopo Ĵomart kaj Nataŝa pro ilia multjara  
elstara kontribuo al la muzika kulturo de Esperanto

Bonvenigo Ĉefurbestro de la urbo Aalen, Frederick Brütting Omaĝo  
D-ro Ulrich Matthias, estrarano de la FAME-Fondaĵo  
Transdono Ĉefurbestro de la urbo Aalen, Frederick Brütting kaj  
Andreas Emmerich, prezidanto de la FAME-Fondaĵo  
Dankvortoj de la premiitoj Ĵomart kaj Nataŝa  
Muzika parto kelkaj kantoj de la premiitoj: Ĵomart kaj Nataŝa mem  
kontribuos per fina koncerteto al la solenaĵo



Post la solenaĵo la urbo Aalen  
invitas al renkontoj ĉe  
malvarma bufedo kun  
trinkaĵoj.

Inge promesis al la gastoj, kiuj venis al Aalen  
por ĉeesti la transdonon de tiu FAME-premion,  
organizi gvidadon tra la urbo.  
Vendrede ŝi proponis viziti la Zeiss-Muzeon de  
la firmao Carl Zeiss. Tie videblas pli ol mil  
eksponaĵoj sur 1000<sup>m</sup><sup>2</sup>, la evolua historio de la  
produktoj kaj teknologio de la firmao.  
Sabate matene estis ebleco viziti la grandan  
bazaron (fruktoj, legomoj, floroj) en la urbo-  
centro.



## Zamenhof-festo ĉe la tri landlimoj

**Luksemburga Esperanto Asocio kaj Esperanto-Thionville komune partoprenis la Zamenhof-feston en Francio proksime de Luksemburgio kaj Germanio la 11an de decembro 2022.**

**Je la 10a30, 17 homoj el diversaj nacioj rendezuis en mez-epoka vilaĝo Sierck-les-Bains ĉe rivero Mozelo. Brian Moon ĉiĉeronis kaj rakontis pri la historio de la pitoreska eksban-urbo kun ĉirkaŭaj vitejoj kaj la strategia fervoj-linio de "bomboj" kiu laŭiras ĉe la rando de Mozelo de Thionville al Koblenco tra Treviro.**



**Tagmeze ni manĝis en la restoracio "Le Clos de La Ravine" en la apuda vilaĝo Apach tre proksime de la famkonata luksemburga vilaĝo Schengen kaj germana Perl. Tre bongustan manĝaĵon oni servis al ni, kiel ĉefan pladon:**

**"Turnedosa apro-fileo kun nigraj kantareloj aŭ numidaĵo kun batata farĉaĵo kaj porto-vina saŭco aŭ foli-pastaĵo kun fungoj, legomoj kaj terpomoj.**

**La etoso estis tre bona kaj malkrokodila.**

**Postagmeze Jean-Luc Thibias prezentis la novajn librojn en Esperanto kaj sukcesis allogi la legantojn por akiri librojn.**

**Nun nia asocio Esperanto-Thionville pripensu organizi novan Zamenhof-feston en 2023 sur franca flanko. Poste, laŭvice reprenos la torĉon Luksemburga Esperanto Asocio.**



Teksto kaj fotoj de Bruno HENRY

# Zamenhof-festo en Freiburg

## la 17an de decembro 2022

Jen alvenis la vico al la grupo de Freiburg por organizi la Zamenhof-feston de niaj tri landlimaj regionoj. Kiel planite, ĝi povis okazi la 17an de decembro.

Ni estis kore invititaj veni al la sidejo de la grupo, ilia klasika "Treffpunkt", ĉambro 5.

Por atingi la lokon eblis veturi per trajno al Freiburg kaj de tie per tramo. Certe necesis alfronti la frostan malvarmon (-5) kaj en Müllheim la kaosan stacidomon. (fakte tute detruitan kaj ŝajne rekonstruatan).

Ĉirkaŭ la 11a jam troviĝis deko da samideanoj en la kunvenejo, kie ni estis agrable akceptitaj. Jen okaze por retrovi samideanojn en realo, anstataŭ nur en zoom-kunvenoj. Ursula proponis, ke ĉiuj sin prezentu.

La sinprezentado iris laŭ la tuta tablo. Ni eksciis, ke du membroj de BEMI (biciklista Esperanto Movado Internacia) ĉeestis kaj planas baldaŭ bicikli al Berlino por poste partopreni la semajnon "JES" (Junulara Esperanto-Semajno). Gratulon kaj sukceson al ili.




Jam proksimiĝis la tempo por la unua preleganto, nome Gereon Janzing. Li planis prezenti multajn insulojn, kiujn li viziti, eble eĉ tie loĝis. Sur insulo la hejmm-teritorio estas konata, ĉar limigita de la maro. Li prezentis multajn fotojn kaj plej ofte la endemiajn bestojn, plantojn aŭ eĉ lingvaĵojn. Li kompetentis por klarigi la nomojn de la bestoj per la scienca latina nomo.

luj insuloj estis neloĝataj kaj sen vegetaĵoj

**Gereon Janzing** naskiĝis en Aachen en 1963 kaj kreskis en Nigra Arbaro. Li studis etnologion, geografion kaj biologion en Freiburg. Li ŝatas labori kun bestoj kaj dum multaj someroj en la Alpoj li estis paŝtisto por bovinoj, ŝafoj kaj kaproj aŭ laboris kiel fromaĝisto. Tre ofte li laboris en Grizono, kie li eklernis la „kvaran svisan lingvon” – la romanĉan – kaj verkis lernolibron pri ĝi. Hodiaŭ li estas sendependa vivoartisto.

Sed necesis iom interrompi la prelegon, ĉar alvenis la manĝohoro.



En tute proksima itala restoracio "Taormina" ni rendevuis por la tagmanĝo. Ĉiu povis mem elekti sian manĝon aŭ sian picon.



Dume viglis la diskutoj kaj la interkonatiĝoj.



Post la tagmanĝo Gereon Janzing prezentis pliajn interesajn fotojn kun multaj endemiaj bestoj kaj plantoj. Ni admiris liajn konojn pri botaniko kaj biologio. Ni komprenis, kiom li ŝatas kaj ĝuas la naturon. Sur insuloj estas ofte uzata loka dialekto aŭ lingvo, tial li volonte montris ŝildojn en tiaj lingvoj.



Jen nova programero: ĉiuj estis invititaj por kafumado. En amika etoso ni ricevis kafon aŭ teon kaj diversajn kukojn.

Dume Manfred prezentis diversajn brokantajn librojn, kies profito estos por la Esperanto-grupo en Goma en DR Kongo. Krome li klarigis pri la situacio tie kaj la klopodoj por havigi akvon.



Pasis la tempo, tiam Ursula petis al Edmond prezenti sian prelegon, kies temo estis: **Turno-punkto.**

Edmond pretigis tekston, en kiu li skizis siajn sentojn pri la situacio de nia asocio, kiam eblis, per senpagaj anoncoj en gazetoj trovi perkorespondajn lernantojn. Tion faris nia samideano J.P. Colnot. La nombro da lernantoj ŝrumpis kaj nun ne plu funkcias perkoresponda kurso. Ĉu la gejunuloj malaperis aŭ ĉu ili aktivis alimaniere?

Edmond deziris montri la situacion de brokantaj

libroj, kiuj daŭre pli abundas. Kiel ekzemplon li menciis la ricevitajn librojn de s-ro Roux el Strasburgo. Nun tiuj 3000 libroj troviĝas en lia subtegmentejo. Ĉu ilin proponi al iuj bibliotekoj prizorgataj de iu instanco? Ĉu kun aŭ sen risko? Ekestis diskuto kun Alfred Schubert el Bavario, kiu jam provis solvi similajn probemojn, en Herzberg per akiro de domo. Ŝajne la Turno-punkto troviĝas ne nur inter la generacioj, sed ankaŭ en la nuntempaj uzataj teknikoj, kiujn la nuna generacio pli sperte regas.



Antaŭ ol alfronti la eksteran froston por hejmen-veturi, ni varme dankis kaj salutis al la organizantoj de tiu Zamenhof-festo, pro bona organizado kun ege amika etoso.

Ĝi donis esperon pri pliaj renkontiĝoj ne nur virtualaj.

Fotoj kaj teksto de Andreo



# La 10-a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto

Okazis de la 3a ĝis la 6a de novembro en la haven-urbo Busano, Koreio

## Kongresaj Kunlaborantoj

KAOEM (Komisiono pri Azia-Oceania Esperanto-Movado) de UEA havas 14 membrajn landojn kaj 1 observantan landon.



La urbo Busano troviĝas ĉe la sud-orienta marbordo de Koreio. Ĝi estas la dua granda urbo de la lando kun mar-rilataj komerco kaj industrio.

Moderne antaŭ la malfermo de la haveno fine de la 18a jarcento, Busano estis malgranda fiŝ-kaptista vilaĝo, sed post tio, ĝi rapide evoluis, kiel tra-irejo de nova civilizacio el eksterlandoj.

La urbo Busano estis grava en la moderna tempo, precipe dum la korea milito inter 1950 kaj 1953 pro la translokiĝo de registaraj ministerioj al Busano.

Krome ĝi ludis gravan rolon kiel eksportan haven-urbon por ekonomia evoluo en la 20a jarcento, kaj nun Busano estas preferata kiel centro de internaciaj konferencoj, festivaloj kaj unu el la turismaj urboj en Koreio.



# LUMINESK

*Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio*

**28.12.2022 - 03.01.2023**  
**Heilbronn / Germanio**

LUMINESK' estas internacia silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio kaj sekvo de la antaŭe private organizita "Internacia Festivalo". Ĝi okazis la sepan fojon kaj enhavas varian kaj altkvalitan programon: lingvo-kurson, prelegojn kaj diskut-rondoj, ekskursojn kaj kulturen vesperan programon. La partoprenantoj venas el 7 ĝis 8 landoj.

Heilbronn prezentas sin kiel junan urbon. La plejmulto de la konstruaĵoj de la "malnova Heilbronn" iĝis viktimoj de la bombado je la 4a de decembro 1944. Nur kelkaj historie gravaj konstruaĵoj travivis la duan mondmiliton, aliaj poste estis rekonstruitaj. Ĝi influas ĝis hodiaŭ la bildon de la urbo kaj estas grava peco de la heilbronna identeco.



## La domo

La junular-gastejo de Heilbronn kun siaj ruĝaj brikoj estas rigardindaĵo kaj situas proksime de La ĉefa stacidomo kaj de la scienca ekspozicio "esperimenta". Ĝi ofertas 180 litojn en 51 ĉambroj, ĉiuj kun duŝejo kaj necesejo. La tuta konstruaĵo estas senbariera kaj ofertas 3 du-litajn kaj 9 kvar-litajn ĉambrojn specife taŭgajn por rul-seĝoj.



Vin-gustumado en la unua vespero

Dank'al la laboro kaj la entuziasmo de Andreas Diemel, helpita de GEA, estas okazo renkontiĝi jarfine ĉe Luminesk'. Paralela E-renkontiĝo nomiĝas NoRo. Finfine post longa paŭzo pro la pandemio de kronviruso la aranĝo povis okazi en la universitata urbo *Heilbronn*, kiu situas en la norda parto de la federacia lando *Baden-Württemberg* ĉe la rivero *Neckar*. La vin-kultivado tie havas longan tradicion. Temas precipe pri ruĝaj specioj de vinberoj.

La aranĝon partoprenis kvindek da geesperantistoj el dek landoj. Dum la unua vespero Barbara Brandenburg prezentis vin-gustumadon de kvin malsamaj vinoj. La sekvan tagon dum la antaŭ-tagmezo ni povis ĉeesti du prelegojn. La unua temis pri "La arkta zono hodiaŭaj aspektoj, ekonomio kaj politiko", lerte

prezentita kun akompanaj bildoj.



Ulrich Brandenburg prezentis tipajn bildojn pri la vivo en arkta zono. Iam temas pri indiĝenoj, iam nur pri profesiuloj de loka flughaveno.







La dua prelego temis pri “La komunejo-bild-datenbanko de la vikipedioj” prezentita de Renardo Fössmeier.



Kristin Tytgat gvidis E-konversacion por interesatoj.

Posttagmeze Christoph Roether interese prelegis pri “Luno, suno kaj tajdo, kiel ili interrilatas”. Poste okazis ateliero de JoMo pri kanto-verkado. Pro la influo de la ĵus finita prelego pri kosma fenomeno estis facile elekti temon: “Tajdo”. JoMo unue prezentis la skemon, donis regulojn kiel verki tekston kaj samtempe komponi muzikon. Li uzis sian malgrandan “vojaĝ-gitaron” kaj laŭ naskiĝmonatoj de la ĉeestantoj li tuj havis la notojn, kiujn li transformis al muziko.

Vespere ni per bildoj spektis Baden-Vitembergan prezenton fare de Edmilson Lima Serejo.

En gufujo oni povis refreŝiĝi per biero aŭ teo. Tie Debora McCarney rakontis al ni pri la pitoreska urbeto *Vitoria Gasteiz* situanta en eŭska parto de Hispanio. Belaj bildoj akompanis ŝian prelegon.

Vendrede okazis la tuttaga ekskurso al proksimaj lokoj de *Heibronn*. Necesis uzi nur buson kaj trajnon. En *Neckarsulm* partoprenantoj vizitis la “Biciklan muzeon” kun multe da eksponaĵoj.



- La patrino venos morgaŭ
- *Ama bihar etorriko da*
- La patrino legos la libron
- *Amak liburuak irakurriko du*
- La patrino legos la librojn
- *Amak liburuak irakurriko ditu*
- La patrinoj legos la librojn
- *Amek liburuak irakurriko dituzte*
- Mi venos morgaŭ
- *(Ni) bihar etorriko naiz*
- Mi legos la libron
- *(Nik) liburuak irakurriko dut*
- Mi legos la librojn
- *(Nik) liburuak irakurriko ditut*
- Ni legos la libron
- *(Guk) liburuak irakurriko ditugu*

Debora montris bildojn pri la urbo *Vitoria Gasteiz en Eŭskio* kaj ankaŭ la la eŭskan lingvon, kiun ŝi studas.

Jen ekzemploj de la eŭska lingvo kun post-fiksoj



Poste oni daŭrigis al la historia centro de la urbo *Bad Wimpfen*. Tre ĉarma urbeto kun multaj trabfakaj domoj inter kiuj elstaris unu bele pentrita.



Centoj da bicikloj kaj motorcikloj estis videblaj, de malnova epoko ĝis nuntempe. Iuj eĉ kuraĝis surgrimpi la grand-radan biciklon.





Nia tut-taga ekkurso al *Bad Wimpfen*. En la historia centro.



Vespere gesinjoroj Brandenburg prezentis Torinon, la venontan UK-urbon al kiu ili allogis nin per aperitivo Martini, kafo kaj ĉokolado. Do, tio estis bona instigo por iri al Italio. Mi alportis kvin albumojn pri IF, tiel la partoprenantoj povis revidi sin plijunaĝaj. Poste, en la gufujo kiun prizorgas gesinjoroj Kleemann, Andreo Grossmann rakontis ŝercojn.



Sabate Dieter Rooke parolis pri la historio de SAT kaj Franz Kruse klarigis “Kiel GEA perrete organizas kongresojn”. Post la

tagmanĝo Amri Wandel prezentis tute novan prelegon



“Ĉielaj gastoj: meteoroj, kometoj kaj asteroidoj”. Ĉe la fino kelkaj plenigis demandaron por poste ricevi atestilon pri sukceso. Denove daŭris la ateliero de JoMo pri kanto-verkado. Sekvis Silvestra vespera bufedo kaj koncerto de JoMo,



kiu dancigis la ĉeestantojn. Li ĉiam scias krei admirinde belan etoson. Poste la balo povis komenci per polonezo. Je la 11-a horo vespere venis Novjara bonvenigo el Israelo kaj Latvio. Jam antaŭ la noktomezo aŭdiĝis unuaj antaŭsignoj de la baldaŭa Novjara alveno ĉe ni. Per bondeziroj, ĉirkaŭbrakado kaj kisado ni bonvenigis la Novan jaron 2023-an kaj poste denove dancis.

Dimanĉe antaŭtagmeze ni povis spekti bildprezenton pri la insulo Reunio, Madagaskaro kaj Sudafriko fare de Joel Fontaine kaj Laure Wolff. Poste Amri Wandel prezentis filmon pri Tanzanio, kie devus en la jaro 2024-a okazi la UK. Post la tagmanĝo ni profitis belan sunan posttagmezon por promeni. Iuj ŝatis fari paper-faldadon, kiun instruis Gisela Schröder. Post la reveno la kanto-verkado estis sukcese finita kaj vespere prezentita al la cetera publiko. Samtempe okazis disdonado de atestiloj al la sukcesintoj de la ĉi-foja IVU-sesio aranĝita de Amri.




La antaŭ-lastan tagon Edivaldo Simao de Freitas prezentis la lokan brazilan movadon en Fortalezo. Pli precize li parolis pri sia vivo kaj esperantistiĝo. Poste Jaŝo prezentis “La Decamerone” de Giovanni Boccaccio. La posttagmeza ekskurso gvidis la partoprenantojn al la kastelruinoj *Weibertreu* kaj al la malgranda urbo *Weinsberg*. Vesperon okupis subtitolita filmo “La poŝtisto”. Dum la adiaŭa vespero estis okazo por ĉiuj, kiuj volis improvize sin prezenti. Per tio la semajna aranĝo finiĝis.

Korajn dankojn al la organizantoj de tiu ĉi agrabla evento, kie oni sentas sin en familia etoso kaj ĝuas la lastajn tagojn de la jaro.

Liba Gabalda

## Luno, suno, tajdo influo, efiko kaj retroinfluo




Tre interese prelegis Christoph Roether pri la tajdoj, kiujn provokas la luno al la oceanoj kaj eĉ al la Tero.

Ni ankaŭ eksciis, ke la luno je 400000 km de la tero iomete malproksimiĝas, tamen nur je 3,8 cm jare.



En tiu sama posttagmezo okazis la ateliero de JOMO, en kiu li proponis krei kanton. Li bone klarigis, kian strukturon ĝi havu, kun rekantaĵo, strofoj, ponto.

Poste ekestis la demando pri la temo. Diversaj proponoj stariĝis laŭ la ĉeestantoj. Finfine estis elektita la temo "Tajdo, luno tero", supozeble pro la ĵus antaŭa prelego. En tri postaj vesperoj ni sukcesis finkrei tiun kanton. Jomo ja lerte zorgis pri la muziko.



### Rekantaĵo

Ĉu tajdas nia amikec'  
Ĉar jarcente vi vagas for de mi  
Ĉu tajdas nia amikec'  
Ĉu finiĝos por ni konversaci'

### Strofo 1

Ni kune dancas de jarmiloj  
Miajn tajdojn vi ja logas  
Jes jam aperas maltrankviloj  
Mi la Tero pri vi zorgas  
Kial, kial vi foriras? x2

### Strofo 2

Ĉu ne 'stas mi por vi partnero?  
Ĉu vi havas pliajn revojn?  
Ĉu eblas sen lun' la tero?  
Kiu zorgas maran levon?  
Kial, kial vi foriras? x2

### TAJTO

### Ponto


Ne timu Tero, mia partnero  
Viaj fortaj brakoj altiras min  
Ni povos daŭre danci. Por geamantoj  
Mi ĉiam brilos, kiel Luminesk'

### Fina rekantaĵo

Jes daŭras nia amikec'  
Mi neniam vagos for de vi  
Jes daŭras nia amikec'  
Ne finiĝos por ni konversaci'

Jomo promesis, ke la kanto estos aŭskultebla ĉe Jutubo.

**Nia foto-paĝo**



**Aŭtunaj koloraj de naturo okaze de migradoj**



**Rebriloj ĉe lago**



**Vintro en Suda Koreio**

